Eŭropo Demokratio Esperanto

Gazetara komuniko - 22-a de februaro 2009

Eŭropaj balotoj – konferenco kaj agado en Strasburgo kaj Kehl

Por la membroj de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto, **lingvaj baroj ne ekzistas**. Ili uzas esperanton, internacia lingvo kiu celas faciligi la komunikadon inter personoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. Unua partio, kiu unue organiziĝis eŭropskale antaŭ ol organiziĝi naciskale, la movado Eŭropo Demokratio Esperanto organizas sian **internacian konferencon en Strasburgo de la 27-a de februaro ĝis la 1-a de marto** por ebligi al siaj aktivuloj labori pri la lastaj preparoj de la eŭropaj balotoj.

Kun membroj en ĉiuj eŭropaj landoj, EDE estus ŝatinta kandidatiĝi per nur unu listo eŭropnivele sed balotaj reguloj devigas apartan kandidatiĝon en ĉiu lando kvankam la naciaj reguloj estas tute malebligaj en iuj landoj. Ekzemple, estas necese kolekti 174 000 subskribojn por kandidati en Italujo aŭ ankaŭ pagi kuraĝrabe multege en Litovio. Partoprenkondiĉoj estas malpli drastaj en Germanio, kie la Nobelpremiito Reinhard Selten estos listkapulo.

La 28-an de februaro je la 16a30, en Kehl (MarktPlatz), okazos **kolektado de subskriboj** necesaj al kandidatiĝo en Germanio.
La 1an de marto je la 11a, en Strasburgo okazos **gazetarkonferenco** en la junulargastejo René Cassin. Aktivuloj el diversaj landoj atestos en la franca kaj en la germana pri la utileco de komuna lingvo por Eŭropo kaj disvolvos la aliajn ideojn de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto.

Tiu ĉi evento iel havas historian flankon, ĉar ĝi estos la unua aranĝo, en kiu anoj de politika movado el diversaj landoj kunvenas por – egalrajte kaj tamen sen tradukistoj – debati en neŭtrala lingvo pri la estonto de EU.

Pri Eŭropo Demokratio Esperanto

EDE estas eŭropa politika movado kiu proponas esperanton kiel lingva ilo por konstrui pli demokratian Eŭropon. EDE proponas por Eŭropo justan lingvan politikon kiu favoras lingvan diversecon kaj esprimpovon de ĉiuj civitanoj. La movado naskiĝis en 2003 kaj sukcesis prezenti kandidatojn en Francio dum la eŭropa baloto en 2004. Tiam ĝi ricevis 0,2 % el la voĉoj. En diversaj eŭropaj landoj, EDE-anoj nun preparas sin por partopreni en la Eŭropaj Balotoj de 2009.

www.e-d-e.org

Gazetara kontakto:
Germanujo:
Manuel Cebulla – mc@e-d-e.eu - 0201 78 45 36

Francujo:
Emmanuel Debanne - emmanuel.debanne@free.fr - 06 68 33 78 14